# Aventuro en mondo de ŝajnigado

Jean Codjo



FEL

# Aventuro en mondo de ŝajnigado

Jean Codjo

Tiu ĉi provlibro estas libere kopiebla kaj povas esti transdonita al kiu ajn.

## Aventuro en mondo de ŝajnigado

Estis dum iu lundo, tute varma tago kiel kutime en landoj ĉirkaŭ la ekvatoro. Estis varme, homoj ŝvitis, kvankam neniu tion rimarkis, ĉar ŝvitado estas ero de la ĉiutaga vivo en lando kie trinki akvon tute freŝan estas signo de luksaĵo. Tiu lundo, kvankam simila al ĉiuj aliaj tagoj de la semajno, estas speciala por Dossi. Post naŭmonata elteno de gravedo venis tempo por aldoni al nia jam popolriĉa planedo alian homon, unu homon plian. Ĉu por li jam estis antaŭvidita loko por dormi, manĝaĵo por sin vivteni, lernejo por sin edukadi, respondeco por plenumi? Ĉu brilas la suno, pluvas, kreskas arbidoj, flugas birdoj, pro

plenumata respondeco de homo surtere? Por Dossi, homoj naskiĝas kaj mortas, egale ĉu ili tion deziras aŭ ne. Al Dossi estis tute egale ĉu ŝia filo venu al nia mondo iun lundon aŭ ne: lundo kaj aliaj tagoj de la semajno estas samaj, same kiel la horo aŭ la jaro dum kiu ŝia filo naskiĝis, ĉu la unua aŭ la dua horo, ĉu iu jaro aŭ la alia, statistikaj eroj ne gravas ĉu por ŝi, ĉu por aliaj loĝantoj de ŝia vilaĝo. Nur gravas, ke unua filo ŝia naskiĝos, la naturo sendepende de la homaro prizorgos lin. Tiel estis la vivritmo en Dossihoue, senzorgoplena vivo, nestrikte planita vivo, nekontrolebla vivo, alivorte, vivo de homoj kun neskribaj reguloj. Tiaj homoj, laŭ vidpunktoj de Ne-Dossihouenu (ne-loĝanto de la vilaĝo Dossihoue) estis for de la civilizacio, sekve ili estis primitivaj.

************

Estis denove iu lundo, simila varma tago de Junio de la jaro 1994. Jeko, filo de Dossi, intertempe frekventis lernejon, eĉ ekstudis en la tiama unika universitato de sia lando. Intertempe evoluis vole-nevole pensmaniero en Dossihoue: scii kaj plani laŭ eŭropa vidpunkto iĝis pli kaj pli grava, eĉ scipovi la lingvon de Eŭropo iĝis kondiĉo por esti respektata. Jeko sufiĉe bone scipovas ne nur unu, sed kvar eŭropajn lingvojn. Li eĉ legis verkojn de famaj eŭropaj verkistoj□: Goethe, Shakespeare, Blaise Pascal, ktp.

Tiun lundon de junio 1994 devis okazi plia paŝo al la civilizita mondo, surtera paradizo, kie vivas nur homoj kun honesta kaj klare esprimita intenco.

Homoj el tiu mondo ĉiam estas ĝentilaj, pro tio ili sin permesis konkeri alian parton de la terglobo por instrui regulojn de ĝentileco  al la homaro. Tiun lundon de 1994 Jeko devis enaviadiliĝi unua-foje kun la intenco konatiĝi kun la sekreto de sukceso de la paradiza mondo. En lia kapo interbatalis timo kaj ĝojo, fiereco kaj necerteco. Kiom longe daŭros la vojaĝo? Kiel funkcias tiu paradiza mondo? Kial oni tie sukcesas kaj ne en Dossihoue? Ĉu pro koloro de la haŭto? Sinsekvajn demandojn post demandoj Jeko faris al si kun la espero, ke li havos respondojn taŭgajn tuj kiam li elaviadiliĝos. Pri unu afero li jam certis: viziti paradizan landon ne eblas sen antaŭe montri iun dokumenton por certigi, ke temas efektive pri li, kiu rajtas tien iri. «Certe en tiu mondo, tia dokumento estas pli grava ol la homo»

sin diris Jeko. La vojaĝo eterne daŭris, de Dossihoue al Germanio tra Libio kaj Moskvo.

Tiu ĉi senpaga provlibro enhavas nur parton de la verko. La kompleta libro, ĉu en papera versio, ĉu kiel e-libro, estas aĉetebla de www.retbutiko.net aŭ de retbutiko@fel.esperanto.be

# Kolofono


| | |
|---|---|
| Titolo | Aventuro en mondo de ŝajnigado |
| Aŭtoro | Jean Codjo |
| Kovrilo | Julia Litvinova |
| Tekstaranĝo | Erik D'Hondt kaj Paul Peeraerts |
| ISBN | 978 90 77066 42 3 |
| UDK | 82.3.892 |
| NUR | 300 |
| Leĝa depono | D/2009/2924/2 |

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140 - BE-2000 Antverpeno
www.retbutiko.be

© 2009 FEL, Antverpeno